

# HEEJS

## BULTENO DE LA HISPANA ESPERANTO - JUNULARA SEKCIO

Nro. 19

Aŭgusto - Septembro 1961



REDAKTORO: Sro. S. Aragay - Arce, 8, 2.<sup>o</sup>, 4.<sup>a</sup> - Cornellá  
Sidejo. San Jorge n.º 15 (Bar Albéniz)


Barcelono (*Hispanujo*)



Supre: Nova ejo de  
Madrída Esperanta  
klubo.



Malsupre: Membroj  
de Esperanta Fako,  
Lingua Club Manresa  
dum sonprogramo.



17-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE T.E.J.O.

Wokinghan! Grava evento en la historio de Internacia Esperanta Junulara Kongreso! Ĉu? pro la nombro de pli-malpli - 120 kongresanoj el 12 landoj, interesaj diskutoj, prelegoj, amuzaĵoj, ktp.

La 17a I.J.K. de TEJO, estis por ni mirinda do ekde la - malfermo de la kongresejo la programo elvolviĝis harmonie kaj gaje, fakte, la tuta kongresa Komitato bonege laboris - ĉiutage pro la altnivela programo, nur ni deziras mencii - ke eble oni ne povos organizi aliajn kongresojn kiel tiun kiun ĝuis en Wokinghan.

Ni mencias la programon.

Sabato 12 Augusto. - Alvenoj kaj vespermanĝo.

Dimanĉo 13 " " - Diskuta grupo 1 (pri traktis la eniro de Anglujo en la Komuna Merkado), Komuna fotografado, Oficiala inauguro (Poste la saladvortoj de la Delegitoj festparolis Carlo Minnaja). Diskuta grupo 2 (Traktis pri Adolf Eichman). Amuza vespero.

Lundo 14. - Diskuta grupo 3 (spertoj en la agado de la sekcioj de T.E.J.O.). Prelego S-ro M.C. Butler (La uloj kaj istoj de Esperantujo). Vizito al biskvitfabrikejo, Internacia balo kaj konkurso Doktoro Mizantropo.

Mardo 15. - Oratora Konkurso. Prelego. Prof. Ivo - Lapenna (CED kaj ĝia signifo por la nuntempa Esperanto-movado). Diskuta grupo 4 (Pri la lokaj societoj). Oficiala Akcepto. Subĉiela Vespero.

Merkredo 16. - Diskuta grupo 5. Sportaj konkursoj. Ekskurso al Oxford.

Ĵaŭdo 17. - Prelego. S-ro William Auld (La Esperanta literaturo en monda kadro). Prelego S-ro Frank Merrick (Esperanta kantado. Generala kunveno de TEJO.

Vendredo 18. - Tuttaga ekskurso (Windsor, Putney, Londono).

Sabato 19. - Solena Fermo.

Vere la hispana reprezentantaro estis malmultenombra - nur tri gesamideanoj, tamen ĉi-jare nia lando estis reprezentata.

Pliaj informoj aperos

La prezidanto S. Aragoj

Dum la kunvenoj de la komitatanoj la prezidanto de TEJO. S-ro Gunther Becker informis nin ke nepre ĉiuj la landaj - junularaj asocioj devu esti reprezentotaj en la I.J.K. de TEJO (Se ni deziras ke TEJO sukcesos) Pro tio la HEJS-estaro decidis: Spari monojn por pagi la duonon de la prezo de



la vojaĝo al la HEJS-ano kiu deziras reprezenti HEJS al la venonta IJK de TEJO. Eble ĝi okazos en Danlando. Bonvolu sciigi al ni kiun povus interese.

Estraro.--

### INTERVJUO KUN ESPERANTA GVIDANTINO

La pasintan tagon 30 de Junio okazis la fermo de la prima tempa esperanta kurso en la "Grupo Aŭroro".

F-ino Adela, la instruistino de ĉi-tiu kurso ricevis diversajn donacojn de siaj gelernantoj, S-ro Francisko Vilá delikata poeto kaj prezidanto de "Grupo Aŭroro" montris -- ilin al ŝi, dum tri geinfanoj malaperas por aperi post kel kaj momentoj kun enorma belega bukedo el floroj.

Si ridetas kaj montriĝas tre kontenta kaj dankema antaŭ la ĝentileco de siaj geinstruatoj.

F-ino Adela: De kiam vi estas esperantistino?

-- De la jaro 1955.

-- Kiu lernigis vin?

-- S-ro, Isidro Berniol, tre bona esperantisto, kiu nune loĝas en Germanujo.

-- Post nur 6 jaroj vi estas kapabla anstataŭigi vian -- profesoron... Kiom gelernantoj ĉeestis ĉi-tium ĵus finitan kurson?

-- Ĉeestis ĝin, 29 personoj.

-- Inter junuloj kaj fraŭlinoj, kiuj montriĝas pli fervoraj al nia lingvo.

-- Ĉiuj! Sed, la junuloj estas ĝenerale pli atenta kaj pro tio ekparolas Esperanton antaŭ ol ili.

-- En la studado de aliaj lingvoj, ne nur estas intereso al la simpla kono de la lingvo, sed ankaŭ al la historio de tiu lando kaj popolo al kiuj ili apartenas. Ni opinias ke Esperanto ankaŭ kredas sian propran historion -- ene de ĉiuj popoloj. En la hispanaj kluboj, kie oni disciigas Esperanton, apenaŭ aŭdiĝas io pri la faktoj pli elementalaj de Esperantujo. Ĉu estus bona ideo organizi au aranĝi la esperantajn kursojn maniere ke la gelernantoj lernu Esperanton, sed ankaŭ ĝian interese gan historion?

-- Efektive, tia ideo estus tre bona kaj praktika. Estas -- multaj esperantistoj kiuj eĉ ne scias ĉu L.L. Zamenhof estis pola au rusa, kaj ili ne havas absolutan certecon -- kaj fidon pri la utileco kaj valoro de Esperanto.

-- F-ino Adela: je la fino de ĉi-tiu mallonga intervjuo, ni petas vin ke vi salutu la simpatiajn gehejsanojn.

-- Jes. Tre plaĉe, Mi ĉiam estas ĉe vi ĉiuj kaj deziras, ke H.E.J.S. atingu absolutan sukceson.

Si silentiĝas kaj ridete karesemas la florojn, kiujn siaj gelernantoj donacis al ŝi.

Tiel, modeste kaj sembrue, Esperanto etendiĝas seninterrompre tra la tuta mondo


Junulo.

KVINA KRUCVORTA ENIGMO

HORIZONTALE.- 1 (Rad.) Faruna manĝaĵo. Ceso de agado.- 2 Parto de la kapo. Sovaga bov.- 3 Prepozicio.- (Inv.) Fermo de vojo por malhelpi la trairon.- 4 (Rad.) Insekto donanta mielon. Kuirvazo.- 5 Nure. Prepozicio.- 6 (Inv.) Pli ol sufiĉe. (Rad.) En ŝakludo, movi samtempe la reĝon kaj turon.- 7 (inv.) Post la dua. (Rad.) Kolekto da leĝoj.- 8 (inv.) Prefikso. Amika, sincera.- 9 Granda laŭ dimensio, - kiu estas nek longeco, nek alteco. (Rad.) Sarg-besto.

VERTIKALE.- 1 Stato de nacio kiu ne militas kontraŭ alia. (Inv.) Konjunkcio.- 2 (Inv.) Favora, profita. Perforte forpreni ion, kio apertenas al alia.- 3 Konjunkcio, Verbo esprimanta la ekziston.- 4 Parto de la korpo kuniganta la kapon kun la trunko. (Inv.Rad.) Karakterizata per tranĉa aŭ pika rando.- 5 Adverbo signifanta malaperon aŭ malproksimecon. Longa, mallarga kaj plate maldika peco da ligno.- 6 (Rad.) Sin vidigi, fariĝi videbla. (Inv.) Prefikso.- 7 Amaso da akvovaporoj pendanta en la supra atmosfero (Rad.) Estiĝi, fariĝi en iu loko aŭ momento.- 8 (Rad.) Metalo. Ujo portata ĉemane kaj uzata por teni paperaĵojn, dokumentojn, librojn, ktp.- 9 (Akuz) Organa korpo produktata kaj eligata de inoj de birdoj. (Rad.) Meti en posedo aŭ je dispono de iu.

J.M.Gutiérrez



CINIA LETERO

El malproksima Cinio sendis por ni Armand Su, etan artikoo--  
lon pri hispana filmo kaj poemeton, ni klarigas ke armand-  
Su, estas juna ĉina esperantisto, membro de U.E.A. tre amas  
la hispanan kulturon, precipe la poezion kaj la muzikojn -  
de Falla, Albeniz, Granados Ktp. La artikoleto estis skri-  
bita en hispana originalo por li men. En 1957, li ekverkis  
poemojn esperante. Jen estas unu:

LONGE FOR

Malplena estas l'aŭtuna ĝarden;  
Mi vagas sola je ĉi malfrua hor'  
Junec', amo jam pasis sen reven;  
Ĉio de mi amata estas longe for

Mi rigardas al la ĉiel' malhela,  
Kaj revo kreiĝas en mia memor;  
Kie estas nun mia amatin' bela?  
Ĉio de mi amata estas longe for, (1958)

Recientemente he visto una eplicula española titulada "El-  
batallón de las sombras", la cual me ha impresionado mucho.  
Sus personajes, el actor bondadoso, el pintor, el composi--  
tor iracundo, Isabella la muchacha hermosa y otros me pa-  
recen muy simpáticos. A pesar que ellos son de diversas --  
profesiones, cae sobre todos, el mismo destino infeliz. Esta  
película ha revelado la crueldad de la vida. Particularmente  
una escena me ha conmovido profundamente; Carlos el joven-  
pintor, estando muriéndose dice a la muchacha secretamente  
amada, sollozando: "Ninguna mujer me ha amado, ninguna ha  
querido besarme" Despues el le confiesa su amor sincero y  
ella le responde con un beso, primero y también el último.  
Pero el amor vino demasiado tarde y no puede salvar al pin-  
tor infeliz de su enfermedad incurable. Esta escena era tan  
enternecedora que las lágrimas llenaron mis ojos.  
Esta película me ha gustado mucho. Todos los actores y ac-  
trices son muy buenos. La música es maravillosa, particular-  
mente las melodías de la ópera "Cántame usted su vals" son  
inolvidables.

Armand Su

No existe otro mal que el que tú haces o padeces, y uno y  
otro vienen de ti.